



Bulletin mensuel de la FÉDÉRATION DES GROUPES ESPÉRANTISTES DU NORD DE LA FRANCE

(NORD, PAS-DE-CALAIS, SOMME)

RÉDACTION ET ADMINISTRATION :

E. DELIGNY, gérant, 4, rue Allent, St-Omer

Abonnement : 3 frs par an.

Eksterlande : 6 fr. fr.

TOUS à BOULOGNE le 26 JUILLET POUR INAUGURER la PLACE L.L. ZAMENHOF

NIA REVUO.

La unua numero de NORDA GAZETO estis tre favore akceptita en la tuta Federacio. Multajn gratulajn leterojn ni ricevis ; la nombro de la abonoj kaj la reklamoj permesas al ni de nun aperigi nian revuon dekfoje dum la jaro, sen plialtigo de la abonprezo.

Kelkaj grupoj petis specimenojn sed ne konigis ankoraŭ la nombron de la abonantoj. Ankaŭ kelkaj izoluloj, kiuj ricevis la unuan numeron, ne sendis sian abonon. Ni tre esperas, ke ni gajnos ambaŭflanke novajn subtenantojn.

Al ĉiuj, kiuj nin helpis per siaj sugestoj, konsiloj, abonoj, ni adresas nian plej koran dankon. Ili daurigu sian subtenon kaj nia NORDA GAZETO farigos interesa revuo, kiu kunligos la grupojn de la Federacio kaj multe helpos al la disvastigo de Esperanto en nia regiono.

Unu el niaj junaj samideanoj, Sinjoro Felix BOITEL, el Saint-Omer, bonvolis desegni por nia revuo la titolon, kiun vi trovas hodiaŭ, ni ĉi denove tulkore dankas kaj gratulas.

Boulogne-sur-Mer

Nos amis de Boulogne préparent activement les fêtes du Congrès. Nous pouvons dès aujourd'hui donner les grandes lignes de notre journée du 26 Juillet :

9 à 10 h. - Réception des Congressistes.

10 à 12 h. - Assemblée Générale.
12 h. - Réception officielle à la mairie.

13 h. - Banquet.
15 h. - Inauguration de la place Zamenhof.

16 h. - Visite au monument Ferber (boulevard Ste-Beuve) et dépôt d'une gerbe.

17 h. - Visite de la Ville.

Le Président du Groupe a reçu la lettre suivante :

« J'ai l'honneur de vous accuser réception de votre lettre du 18 Mars courant, m'informant que le Congrès Fédéral Espérantiste aura lieu le Dimanche 26 Juillet.

« Je m'empresse de vous informer que la Municipalité recevra volontiers officiellement les Congressistes à l'Hôtel de Ville à cette date.

« Veuillez agréer...

« Le Maire de Boulogne,

« signé : E. WARLUZEL. »

Cotisation à la Fédération

Conformément à l'art. 7 des Statuts, les Trésoriers des Groupes et les Espérantistes isolés sont priés d'adresser le plus tôt possible le montant de leur cotisation (3 francs) à la Trésorière Mme Waerenier, 31 bis, rue Jeanne d'Arc à Lille.

ABONNEMENTS

Les groupes et les isolés qui ont contracté des abonnements à NORDA GAZETO sont priés de nous adresser le montant de ces abonnements.

Nous avons adressé le premier numéro et nous adressons le second à un certain nombre d'Espérantistes non affiliés à notre Fédération. Nous prions ceux d'entre eux qui désirent continuer à recevoir notre organe de vouloir bien nous adresser le montant de l'abonnement. A partir du troisième numéro nous ne ferons plus l'envoi à ceux qui n'auront pas répondu à cet appel.

EXTRAIT DES STATUTS

Art. 7. - Les Associations adhérentes à la Fédération paient à cette dernière une cotisation annuelle de 3 fr. par membre (dont 1 fr. pour la Fédération et 2 fr. pour la S. F. P. E.

Art. 8. - La Fédération est représentée par un Conseil Fédéral et un Bureau.

Le Conseil Fédéral se compose des délégués de toutes les Associations à raison d'un délégué par 30 membres ou fraction de 30 membres ; chaque association disposant d'autant de voix qu'elle compte de membres. Les membres isolés n'ont droit à aucune représentation.

Le Bureau administre la Fédération sous le contrôle du Conseil Fédéral. Il se compose de six membres : un Président, trois Vice-Présidents, un Secrétaire et un Trésorier, tous élus pour

un an, le jour de la réunion générale de la Fédération.

Réunion de Comité

Une réunion du Comité de la Fédération aura lieu sous peu pour fixer l'ordre du jour de notre Congrès ; cet ordre du jour sera communiqué par voie de notre journal et pourra ainsi être étudié avant notre réunion annuelle.

Nous prions donc tous ceux qui ont des propositions à faire pour cet ordre du jour de vouloir bien nous en informer avant fin Avril.

ALVOKO

La Grupo Esperantista de Boulogne petas la samideanojn, precipe la ĉeslintojn de la Unua Kongreso, ke ili bonvolu helpi al la starigo de memortabulo je la honoro de nia Majstro sur la placo Zamenhof, voĉdonita de la Urba Konsilantaro de Boulogne-sur-Mer, pro memoro de la UNUA UNIVERSALA ESPERANTISTA KONGRESO en Boulogne.

Donacoj estos gratule akceptataj.

Compte chèques postaux 27587, Lille Sro V. Haignéré, 40, rue d'Isly, Boulogne-sur-Mer.

Unua listo de subskribintoj :

		Frs
Fino Pannevin	Boulogne	100
Gesinjoroj Duchochois	»	100
Sro Michaux	»	100
Sro Sergeant	»	100
Sro Sergeant	»	100
Sro P. Gras	»	25
Sro Barthélémy	»	100
Fino Deligny	St-Omer	10
Sro Deligny	»	50
Sro H. Favre	Paris	10
Sro Honoré	Boulogne	100
Sro J. Ansel	»	10
Sro Perrin	Calais	20
Sro Alb. Humez	Douai	25

Dans les Groupes

ROUBAIX

La Societo AL FRATIGO PER ESPERANTO jam de 5 jaroj regule kunvenadas ĉiun merkredon je 19 h. por amika interbabilado. Ejo estas disponita de la urbo 178, rue Jules Guesde, Roubaix. La membroj estas laboristoj. Komitatano la grupo ne havas. Ĝi estas unika grupo de Roubaix.

TOURCOING

En Popoldomo de Tourcoing funkcias esperantista laborista grupo « NIA ESPERO » ; kunveno okazas regule ĉiudimanĉe matene. Ĝi estas unika grupo de Tourcoing. La mem-

broj estas laboristoj. Tre energia kaj temperamentplena gvidanto estas Sro Ch. DOUCHEZ, 154, rue Carpeaux, Wasquehal (Nord).

ROUBAIX,

TOURCOING, WATTRELOS, K. c.

La Geesperantistoj de niaj urboj estas petataj sin turni al Sinjoro

Kleber VANNESTE, 91, rue Cadeau, maison 2, à Tourcoing, pri ĉiuj esperantajoj, gazetoj, revuoj, libroj, k. t. p.

M. CART

Le 31 Mars, le « gardien de notre langue », Président de l'Académie Espérantiste M. Carl a atteint ses 76 ans. Notre revue se doit de lui adresser ses félicitations et ses meilleurs vœux.

Les Congrès

23-25 Mai. - Congrès de la Société Française à Dijon.

Cotisation : 10 francs.

Banquet : 35 francs. (24 Mai).

Excursion à Beaune : 50 fr. (25 Mai).

Chèque postal au nom de M. BOUILLOT, 4 rue Philibert Papillon à Dijon, N° 207-93, Dijon.

23-26 Mai. - Congrès de la Ligue Belge à Nieuport.

Cotisation : 10 fr. belges.

Banquet : 30 francs belges.

S'adresser à M. Léon BRAET, Longue rue, 6, à Nieuport.

26 Juillet. - Congrès de la Fédération du Nord à Boulogne.

1-8 Août. - 23e Congrès Universel à Cracovie.

Cotisation : 125 francs français.

Adresse : Universala Kongreso de Esperanto Lubicz, 34, Cracovie (Pologne).

La Esperantista standardo

Anguleto de nia historio

La esperantista standardo flirtis kaj nun ankoraŭ flirtas en ĉiuj niaj festoj en la tuta mondo. Ĉiam ĝoje la Esperantistoj, alvenante en urbon, kie okazas kongreso, vidas ĉe la stacidomo, en la akceptejo, ĉe l'fenestroj de samideanoj, la verdan standardon kun ĝia samkolora stelo en la maldekstra angulo, sed... kiom da ili konas la historion de nia standardo, simbolo de frateco kaj de interkonsento inter la popoloj ?

Jen anguleto de nia historio, kiun estas taŭge klarigi.

Iom antaŭ la unua universala Kongreso de Boulogne-sur-Mer, la pioniro de l'unuaj tagoj, MICHAUX decidis, jetinte la ideon de l'unua kongreso,

kunigi el ĉiuj partoj de la mondo la unuajn propagandistojn de Esperanto por vidi fine, ĉu oni povas sin kompreni alimaniere ol per nura korespondado. Jam, en 1904, en Calais kaj Dover estis organizata kvazaŭa Antaŭkongreso, en kiu kelkaj ardaĵ apostoloj de la internacia lingvo estis skizintaj la gravan provan kunigon por la venonta jaro. Oni estis en tiuj heroaj tempoj, kiam Esperanto estis ankoraŭ fuŝmokitita memore de « volapük », kiu estis elvokinta la senbridajn mokojn de ĉiuj humoristoj, multe pli inklinaj vidi la ridigan flankon ol la ideon, kiun ĝi portis en si de ĝenerala interkomprenigo.

MICHAUX kaj lia grupo (tiu mem, kiu nin invitas dum venonta Julio en la urbon, kiun pluraj Esperantistoj baptis de tiam la « Mekka » de Esperanto, kaj kiu ĵus renaskiĝis sub la vigla antaŭenpuŝo de kamarado DUCHOCHOIS, efektivigante la unuigon, kiun predikis dum dudek jaroj kamarado SERGEANT, de la grupo Venda Stelo) estis laboreme preparintaj la unuan grandan kunvenon esperantistan, antaŭvidinte logadon, festojn, festenon, akcepton, k. t. p.

Ni ĵus nomis la tri aŭtorojn de nia standardo.

MICHAUX kaj SERGEANT estis ple-dintaj unu kontraŭ la alian (ambau estis kaj estas ankoraŭ advokatoj en Boulogne) ; interŝanĝintaj dum la audienco kelkajn oratorajn sagojn en najbara urbeto Samer, ili parolis pri la baldaŭa okazaĵo, la unua tutmonda kongreso, al kiu jam alfluis aliĝoj el ĉiuj partoj de la mondo. Sur la bordo de la rivero Liane, tuj post la eliro el la stacidomo, ili renkontis DUCHOCHOIS, tiam vie-prezidanto de la grupo, kiu ilin akompanis en la urbo. Oni ĝojis pri ia antaŭvido, tiam certa, de la sukceso de la kongreso ; la aventuro devis tute prosperi ; la sukceso sin anoncis certigita.

La Esperantistoj havis sian instigon : la verdan stelon, akceptitan de Zamenhof en 1891 ; oni jam parolis pri himno ; sed ili ne havis standardon ; niaj tri amikoj opiniis, ke tio estas manko korektota. Tuj dirite, tuj farite ; oni vizitas komerciston, Sron GRAS, 14 strato Faidherbe (li logas ankoraŭ tie kaj verŝajne ne imagas, ke lia magazeno rajtas havi ian famon), DUCHOCHOIS petas pecon de kreto, kaj sur la vendotablon, desegnas kvarangulon ; poste oni sin demandas, kio estas farota. DUCHOCHOIS songas pri verda standardo kun trikolora strio ; SERGEANT rimarkigas, ke estus pli bone ne naciigi la standardon kaj MICHAUX insistas por ke ĝi havu stelon. Oni pensas tiam pri la angla standardo de l'komercaj ŝipoj, kaj oni decidas akcepti tian formon : ĝi estas ruĝa ŝtofo kun

kruco de Sankta Andreo kaj Sankta Georgio en la maldekstra angulo ; oni do prenos verdan ŝtomon kun stelo en la maldekstra angulo ; sur la ventotablo la desegno formigas. Ĉi tie la juristoj reaperas ; SERGEANT pledis kelkajn monatojn antaŭe dum proceso en unuagrada polico kontraŭ Bulonjanon kiu estis flirtiginta papan standardon ; li memorigas, ke prefekla dekreto malpermesas en nia departemento ĉiun standardon, kiu ne portas distingigan signon de Societo, krom se ĝi estas akceptata nacia standardo ; konkludo : necesas skribi E meze de l'stelo.

Detaleto kiun konas malmultaj samideanoj, kaj dank'al kiu la esperantista standardo desegnita de la tri kamaradoj kaj tuj mendita ĉe la firmo Gras por la kongreso estas verda standardo, longa je unu metro kaj duono, larĝa je unu metro, kaj kiu havas en sia supra maldekstra angulo kvadraton de kvindek centimetroj, kun larĝa verda stelo, meze de kiu estas E, komence litero de la vorto Esperanto.

Kelkajn tagojn poste, dum la unuaj tagoj de Augusto 1905, en la stratoj de Boulogne, sur multaj privataj domoj, ĉe l'fasado de l'Granda Teatro kaj de l'Granda Kafejo de Boulogne, akcepteje de la kongresistoj, fliris la stelumita standardo.

La 9an de Augusto, la kongreso kunsidis en la teatro, kiam aperis sur la tagordo la demando pri la esperantista standardo. En bela oratora eksalto, la samideano OSTROWSKI (Ruso), prenante ĉe la balustrado de l'teatro nun el la standardoj faritaj por la kongreso, ekkriis :

« Ni ne serĉu ; la standardo, kiu nin kondukos al la venko, kiu nin gvidos estonte kaj flirts en ĉiuj landoj de l'mondo, jen ĝi estas. »

Per unuvoĉa akklamado, la kongreso

decidis, ke la oficiala esperantista standardo estos ekzakte la standardo, kiun ni ĉi-supre priskribis.

De jam kvarono de jarcento, ĝiaj kreintoj ĝojis ĝin vidi en multaj kongresoj, kiujn ili partoprenis en malsamaj landoj de Eŭropo. Fotografajoj, poŝtkartoj montris al ili, ke, tra ĉiuj landoj de la mondo, la standardo kreita en Boulogne estas ĉirkaŭrinta la terglobon.

Zamenhof men konfirmis per afabla gesto ilian verkon, subskribante du el la unuaj standardoj kaj ilin datante de l'tago de l'voĉdono ; unu estis donacita al MICHAUX, la alia al SERGEANT.

Nia samideano SERGEANT opiniis sian devon, konservinte ĝin dum dudektri jaroj je memoro de la Majstro, ĝin oferdoni al la internacia Muzeo Esperantista en Vieno, kien ĝin portis amiko DELIGNY, kaj kie ĝi estas nun.

Plua motivo por ke la Esperantistoj konsideru Boulogne kiel preferaman urbon.

Tien ili venos la 26 an de Julio por elvoki tiujn malnovajn memoraĵojn.

Ni esperu, ke antaŭ la memortabulo de la placo Zamenhof, ni povos grupiĝi ĉirkaŭ nia standardo, apud kiu ni kun plezuro revidos ĝiajn tri aŭtorojn DUCHOCHOIS, MICHAUX kaj SERGEANT, kiuj aliĝis al la Federacia Kongreso kaj bonvolis sin enskribi ĉe l'unua rango en la monoferon, kiun ni malfermas por dece honori la kreinton de Esperanto kun la urbo Boulogne kaj la partoprenintoj de l'unua kongreso.

La unuaj ŝipoj, kiuj flirtigis la verdan standardon, estis tiuj de la firmo Duchochois, de Boulogne (1905).

(Represo permesata).

Radio-Angulo

Aŭskultu-petu-gratulu

Radio kaj Esperanto estas ambaŭ internaciaj kaj senlandimaj. Ni devas esti tute praktikaj ĉe Radio ; ni devas ĉiam subteni. Kara leganto, decidu jam nun, ke estonte vi estos daŭre subtenanto de la antaŭmikrofonaj laborantoj por ke ili restu tie. Estas bona reklama metodo havigi antaŭ la okuloj de la publiko la nomon de la varo. Sonigu en la orelojn de la publiko la nomon de Esperanto. Subteau enlande kaj eksterlande ; poŝtkarto el eksterlando estas bona pruvo, ke nia afero estas internacia. Jen via devizo : aŭskultu kaj subteuu.

(Laŭ International Language.)

Dunkerque. — Le Radio-Club de Dunkerque, au cours de sa séance du 21 Mars, a approuvé à l'unanimité le vœu présenté par le Radio Club de France, en vue de l'emploi généralisé de la langue auxiliaire internationale Esperanto par les stations, en particulier pour l'annonce et le résumé des programmes destinés à être entendus à l'étranger.

17 Aprilo. - 17 h. - 17.25 Leipzig (259) Dresden Sro Bassler, 20 jaroj, Laborista Esp. Asocio. 10 min. germane. 20 min. esperante.

3 Majo. - Leipzig-Dresden Dro Dietlerle komencos novan E kurson por komencantoj ĉiudimanche posttagmeze.

3 Majo. - Stockholm-Motala P. Nylen, pri E literaturo.

(Communiqué par M. Heuzé).

FEUILLETON

(1)

La Timema Azeno

(de ALEX. DUMAS)

Ni ne haltis en Brunnen, kiu prezentas nenion rimarkindan : ni nur demandis homon, kiu fumis, sidante sur la benko de la lasta domo, ĉu ni sekvas la ĝustan vojon al Svitl. Tiu, al kiu ni faris tiun demandon, respondis jese kaj, por pli granda certeco, li montris al ni, je tricent paŝoj antaŭ ni, landanon kaj lian azenon ; kiuj nin antaŭiris en la vojo de ni sekvota, kaj kiuj nin antaŭiros tiel ĝis l'bak ; cetere, oni ne povas erari, ĉar la vojo de Svitl al Brunnen estas velurebla.

Trankviligitaj de tiu klarigo, ni estis perdintaj niajn du gvidistojn malantaŭ kurbiĝo de la vojo, kaj ni jam ne plu pensis pri ili, kiam alveninte al la

loko, kie ili malaperis, ni vidis la kvarpedulon, kiu revenis galopege al Brunnen, kaj kiu, sendube por anonci sian alvenon, donis al sia voĉo la plej altan laŭtecon, kiun ĝi povis atingi. Post ĝi, sed perdante tiom da spaco, kiom Kuriacio vundita, de Horacio sana kaj senvunda, venis la landano, kiu kurante provis la plej persvadan elokventecon por haltigi la forkuranton. Ĉar la lingvo, en kiu tiu bravulo pelegis sian azenon, estis mia gepatra lingvo, mi estis tiel multe kortuŝita de lia parolado, kiel malmulte estis la stultega besto, kaj, je la momento en kiu ĝi pasis apud mi, mi lerte kaptis la ŝnurigilon post ĝi trenatan ; sed ĝi ne kredis sin haltigita, kaj daŭrigis liri siaflanke. Ĉar mi ne volis esti venkita de azeno, mi obstinis kaj tiris mialflanke ; resume, mi ne povus diri, kiu estus venkinta, se mia servisto Francisko ne estus min helpinta, pluvigante sur la postajon de mia

kontraŭulo pluvegon da baloj de sia vojaĝbastono. La argumento estis decidiga. La azeno tuj cedis. En tiu momento, la landano alvenis kaj mi redonis al li la malliberulon.

La bonulo ŝvitegis ; li al ni kredis, ke li daŭrigos sur sian beston la komencitan punkorekton ; sed, je nia granda miro, li ĝin alparolis kun afabla akcento, kiu ŝajnis al mi tiel strange harmonia kun la ĉirkonstanco, ke mi ne povis ne montri al li mian miron pri lia indulgemo kaj ke mi diris al li malkaŝe, ke mi kredas, ke li tute malbonigos la karakteron de sia besto se li ĝin kuraĝigas por tiaj kapricoj.

— « Ha, li respondis al mi, tio ne estas kaprico ; sed nur ĝi timas, tin kompatinda Peĵo.

— Kion ĝi timas ?

— Ĝi timas fajron, kiun infanoj ekbruligis sur la vojo.

(Daŭrigota)

Hôtel Moderne*Marcel BRAY, Propriétaire*

Tout confort - Prix modérés

58, rue Amiral Bruix
et 8, rue Faidherbe

BOULOGNE-S.-MER

Télep. 3.69

*Oni parolas Esperante.***GRAND GARAGE THIERS**

35, rue Thiers, 35

BOULOGNE-SUR-MER

à côté du Grand Café

MATHIS - CHEVROLET

BUICK - VOISIN

HOTEL*Brasserie Liégeoise***Restaurant**

8, rue Monsigny 8,

BOULOGNE-S.-MER

Paul MARMIN, Propriétaire

Télep. 0.99

HOTEL MEURICE

RESTAURANT

Prix fixe et à la carte

35, Rue Victor Hugo, 35

Boulogne-sur-Mer

Télep. 1.07

Ad. LACROIX & Cie

VÊTEMENTS

BOULOGNE-SUR-MER

5, Grande-Rue 5,

Mêmes Maisons: Calais, Dunkerque,
St-Omer, Metz, Abbeville, Le Havre, Douai,
Lille, Cambrai, Le Cateau, Amiens, St-Quentin,
Valenciennes, Maubeuge, Lens, Roubaix, etc.

LA FEMME CHIC

EST CLIENTE DES

MODES PARISIENNES

19, rue Victor Hugo - Télep. 1055

BOULOGNE-SUR-MER

Modèles les plus variés
Coupe impeccable

PRIX TRÈS AVANTAGEUX

LIQUEURS TROGNEUX

Impérial old Port

VINS-SPIRITUEUX

C. BOULAN

93, Rue Faidherbe, 93

BOULOGNE-S.-MER Télep. 2.30

Oni korespondas Esperante.

TOUS les ARTICLES

de PÊCHE pour la

Mer et la Rivière.

Paul GRAS & C^e

Rue Faidherbe, BOULOGNE-S.-MER

Catalogue sur demande

Pour bien entendre

:- les :-

Émissions espérantistesPrenez le monopole **A. 32**

Imbattu comme prix et qualité.

Démonstration à domicile et chez

MAUSTON René, Place Dalton.

(Près chez M. Millon).

COUPELLERIE

ORFÈVRERIE

PETYT FRÈRES & Cie

— Boulogne-sur-Mer —

Chaussures ANDRÉLes Meilleures
-- en France --

LE PLUS GRAND CHOIX

AUX PRIX LES PLUS BAS

VINS**MILLON**

Maison fondée en 1896

par **A. MILLON**

BOULOGNE-SUR-MER

Oni korespondus Esperante.